M e d i c i n a j   p a ĝ o j …

La medicino en Montrealo

(Laŭ la letero de D-ro G. Silvay, C.Sc. en la ĵurnalo „Pravda“ Bratislava, la 9-an IX. 1967)

La Kanada Kuracista Asocio festas ĉi-jare sian 100-jaran jubileon, do nemirinde, ke en Kanado kaj precipe en Montrealo okazis multaj kuracistaj kongresoj. En julio efektiviĝis la kunsido de Internacia Ĥirurgia Asocio kaj ĉi-okaze mi havis la eblecon viziti ankaŭ EKSPON 1967 kaj informiĝi pri ĝia medicina parto.

Du temaj pavilonoj, Homo kaj Vivo, Homo kaj Sano, estas tute dediĉitaj al prezentado de la nuntempaj scioj pri la viva materio kaj la plej modernaj progresoj en la kuracado de unuopaj malsanoj. „Mediteatro“ en la pavilono Homo kaj Sano estas sintezo de faka ekspliko, filmoj kaj praktikaj elmontroj pri operacio de koro pro denaska difekto, helpe de aparato por eksterkorpa sangocirkulado, pri kuracado de parkinsonismo per interveno en la centran nervosistemon, pri la uzado de artefarita reno, pri alplanto de artefarita mano, kiun la paciento tre bone estras, kaj pri utiligo de radioizotopoj en la medicino.

Dek pavilonoj de unuopaj statoj dediĉas parton de sia ekspozicio al medicino. Svislando prezentas la historion de Internacia Ruĝa Kruco, kaj la modernajn ekipojn de la farmacia industrio. Italio kaj Hindio montras memoraĵojn el la unuaj malsanulejoj. La franca ekspozicio okupiĝas pri renotransplantado, pri artefarita koro kaj genetikaj esploroj. Sovetunio demonstras la sukcesojn de sia sanitara sistemo kaj ekspozicias modernan operacian halon. En la angla pavilono de Germana Federacia Respubliko estas ekspoziciataj rentgen-aparatoj de la unua ĝis la nunaj, plej modernaj. En la aŭstralia pavilono du „parolantaj seĝoj“ – france kaj angle – informas la laciĝintajn vizitantojn pri la organizo kaj esploro en la medicino.

Ĉeĥoslovakio ne skpoziciaj ekipojn, sed en la fotoalbumoj mi trovis parton, dediĉitan al medicino. Belega kolekto da fotografaĵoj, dediĉita al la 50-jara jubileo de Prof. D-ro Karlo Šiška, D-ro Sc. entenas ilustraĵojn pri la vivo kaj laboro liaj kaj de liaj kunlaborantoj en la 2-a Ĥirurgia Kliniko de Medicina Fakultato de Komenský-Universitato por Eksperimenta Ĥirurgio en Bratislava, kies fondinto kaj gvidanto li estas.

La medicina parto de la Ekspozicio 1967 „La Homo kaj Lia Mondo“ ebligas ne nur al kuracistoj, sed ankaŭ al laikoj ekhavi kompletan bildon pri la progreso de sciencoj kaj tekniko en la batalo por la plej granda trezoro de la homaro – la sano.

-- 0 –

La UMEA-kunveno en Rotterdamo (laŭ la raporto deJoz. Ed. Ambrož el Brno) oakzis en granda luksa salono por eble pli ol 200 personoj, sed bedaŭrinde da partoprenintoj ne estis pli ol 20! Ne partoprenis la prezidanto D-ro Ŝinoda. Lia anstataŭantino D-rino Muramacu tralegis lian mesaĝon. Ankaŭ la sekretariino D-rino Jarnuszkiewicz el Krakovo ne partoprenis. La aferon tute malzorgis la nederlandaj kuracistoj – ĉeestis nek unu! La tuta programo devis estis improvizita lastamomente. Estis traktitaj:

a) problemo de kunlaboro kun Ruĝa Kruco – la afero ankoraŭ ne progresis

b) revuo – la pasintjara propono de D-ro Kalocsay ne fektiviĝis. La plej grava obstaklo estas la ekonomia problemo, same kiel ĉe Med. Internacia Revuo.

c) faka terminologio: D-ro Albaŭlt el Italio raportis pri la malfacila laboro, en kiu la unua paŝo estas komplitado de baza medicina vortaro kaj poste specialaj fakvortaroj.

d) Raporto pri fonda kunveno de Medicina Sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato.

e) Raporto Sanitara Sekcio de UMEA.

f) Raporto de la kasisto de UMEA („Malriĉeco ne perdas honoron“ – mi diris amare en konsento kun la ceteraj).

g) Prelego de D-ro Miĥaelo Bálint (baalint): Psiĥoterapia aliro al la kuracado de depremo (depresio). Tralegis ĝin D-ro Barasi. Temas pri la prelego, kiu sekve de tempomanko ne povis estis prezentita pasintjare en Budapeŝto.

Estis rekomendite komenci la preparadon de la venonta kunveno jam nun, por ke la programo estu zorge kompilita, riĉa kaj kun fakaj ekskursoj. Uzi ĉiun tagon de UKE por trakti specialajn problemojn kiuj koncernas niajn aferojn-agadon, por ke la rezultoj estu praktike uzeblaj kaj publikigindaj.
Dům la kunveno estis disdonitaj: la broŝutero de D-rino Muramacu el Japanio kaj la angla „Synopsis".

La fonda kunveno de Medicina Sekcio Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato okazis la 8-an de julio 1967 dum Esperantista Kultur-Festivalo en la moravio urbo Opava en la kadro de la solenaĵoj omaĝe al la 100-a naskiĝdatreveno de Petro Bezruč, la aŭtoro de Sileziaj Kantoj ktp, sub aŭspicio de UNESCO. Kunvenejo: en Urba Hospitalo. Parttoprenis 17 medicinistoj, inter ili 7 eksterlandanoj. Pro la malĉeesto de Joz. Ed. Ambrož, prezidanto de la Prepar-komitato, la kunvenon gvidis ĝia vicprezidanto D-ro Ludoviko Izák el Martin (Slovakio), kiu pro la stagnado de nia afero proponis la fondon de la Sekcio, kiu grupigos la laborantojn en nia fako surbaze de komunaj interesoj, por ke ili povu esti informataj pri la eventoj kaj atingaĵoj en- kaj eksterlandaj, pere de organizaj kaj fakaj kunsidoj, seminarioj, simpozioj naciaj kaj internaciaj. Plue fondi kaj iniciati la fondon de lokaj grupoj de MS en malsanulešjoj, sanigejoj, ban- kaj kuraclokoj, fakultatoj, sanitariistaj mez- kaj altlernejoj k.s. Krome ankaŭ por instigadi la eksterlandajn medicinistajn grupiĝojn aŭ unuopulojn, ke ili fondu Medicinan Sekcion ĉe ĉiu landa Esperanto-Asocio kaj ke oni ekkunlaboru ankaŭ internacie. La prezidanto Joz. Ed. Ambrož estas gvidanto de Sociale Sanitara Sekcio de UMEA, la vicprezidanto D-ro Ludoviko Izák kaj la sekretario D-ro Jozefo Hradil – fakdelegitoj de UEA pro medicino. Post tralego kaj aprobo de la provizora memstara Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio, sekvia la faka programo.

La faka programo konsistis el prelegoj (krom la unua kun diapozitivoj). D-ro Mužík el Kladno tralegis la tradukon de la artikolo de D-roj Růžička kaj Bartoníček: Pseŭdoulcera sindromo.

D-ro Peter Zlatnar el Ljubljana, Slovenio (Jugoslavio), prelegis pri „Antigenoj de la buŝa flaŭro en la denta pulpo.

D-ro Jerzy Kirczynski el Krakovo (Pollando) prelegis je la temo „Planado de la familio laŭ la termika metodo Palmer-Holt".

Anna Musil, ĉeeflegistino el Poděbrady, ban kaj kuracloko en Bohemio, prelegis pri „Venenaj fungoj" (kun koloraj lumbildoj).

Ĉiuj prelegoj estis altnivelaj kaj vekis ne nur intereson, sed ankaŭ diskutojn. Precipe vigle diskutis D-ro Wiersbitzki (virzbicki) el Greifswald, GDR. Pro tempomanko (la kunveno daŭris 3 horojn), D-ro Jozefo Hradil koncize informis pri la ĝisnunaj agado kaj varbado. El inter 70 konataj ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistaj medicinistoj aliĝis 32 krom kelkaj kunlaborantojn, kiuj ankoraŭ ne sendis aliĝilon. Krome li parolis pri la eblecoj de kunlaboro kun Ruĝa Kruco, pri la neceso eldonadi informilon, kaj pri la fakterminaro de D-ro Albault, gvidanto de Medicina Terminologia Centro de UMEA: D-ro Černý el Lito-měřice kun D-ro Hradil kompilis Ĉeĥan-Esperantan Medicinan Vortaron, sed ne estas mono por ĝin eldoni. Do ĝi servos almenaŭ kiel helpilo ĉela unuaj fakaj tradukoj.

Ĉiuj partopreninstoj ricevis la resumojn de la prelegoj kaj la 2-an n-ron de Ĉijara Esperanto-Agado, informilo de Esperanto-rondeto en Martin, Slovakio, kun recenzoj pri du libroj de D-ro Hans Selye: „Vivo kaj Streso" kaj „Kiel fariĝi sciencisto", el la plumo de Inĝ. Ivan Slávik, kaj kun la artikolo de D-ro Ludoviko Izák „Espernato kaj scienco" pri la obstakloj, kiujn devas fronti la medicinistoj, kloposantaj enkonduki Esperanton en la ĝeneralan uzon en sciencoj…

La ĉeestintoj dankas al la Direkcio de Urba Hospitalo en Opava pro la disponigo de la kunvenejo kaj projekcia aparato same kiel pro la bongusta refreŝigo por ĉiuj partoprenintoj, kvankam origine ni kalkulis nur pri la ĉeesto de 11 personoj.

Ekskurso al Ostrava. Ok medicinistoj kunvenintaj en Opava veturis la sekvan tagon en la najbaran urbon Ostrava. Ili vizitis la anesteziologian apartenaĵon de Urba Hospitalo kun „hiperbara kamero". Ĝi estas fermita ĉambreto cilindroforma, kie la malsanuloj sidas kaj kien superpreme estas enkondukata aero ĝis 2 atmosferoj. La pacientoj enestas dum 2 horoj kaj estas kuracataj pro diversaj oksigenmankaj malsanoj. Tiu ĉi metodo senkonkurence kaj rapide savas la venenigitajn per karbonoksido (CO), efikas ankaŭ ĉe certaj grandaj kontuz-vundoj, kor-operacioj, obliteraj malsanoj ktp. La vizitintoj persone spertis unu sidon kaj aŭskultis la interesajn klarigojn de la lokaj specialistoj en Esperanta traduko. (Interesuloj skribu al D-ro Jozefo Hradil, Ĉeský Dub 137/III, okres Liberec, Ĉeĥoslovakio. Ekspozicion pri ĉeĥoslovakaj kuracaparatoj kaj medikamentoj de la firmao SPOFA aranĝis dum la kunveno en Opava la Sekretario kun helpo de s-ano Bartovič. La propagandmaterialo (esperantigita) daŭrigis la vojon al la kunveno de UMEA en Rotterdamo.

---

Redaktis kaj tajpis D-ro Ludoviko Izák OKSM 2090-2099/634/67V15x71433